

Volume of  
dared h

IRANA  
Esperanto-Asocio

ESPERANTISTO

براندیشان  
پایه

Kultura sezon-revuo en la persa, araba, kurda kaj Esperanto

N-ro: 36, Dua Serio, Vintro 2021

فصلنامه‌ی فرهنگی چندزبانه فارسی، کردی، عربی و اسپرانتو

شماره ۳۶، دوره دوم، زمستان ۱۳۹۹

Marjam Mirzakhani

genia matematikistino

Maryam Mirzakhani, mathematician  
born 3 May 1977, died 14 July 2017

kiu akceptis honorojn  
nur kun **espro** ke tio  
**kuraĝigus**  
aliajn sekvi ŝian vojon."

# IRANA ESPERANTISTO

(Mesaĝo de Verd-ideanoj)

ISSN 1728-6174

## IRANA ESPERANTISTO

Kultura kaj sendependa sezon-revuvo internacia

Dua serio, N-ro 36, Vintro 2021

Bonvenas eseoj, artikoloj, raportoj kaj kontribuoj kondiĉe ke ili ne estu publikigitaj antaŭe. Bonvenas kultur-temaj kontribuoj ĉu en Esperanto ĉu en la persa.

\*\*\*

Ĉia presa aŭ elektronika citado aŭ eldonado de materialoj de IRANA ESPERANTISTO, ĉu originale ĉu tradukite en aliajn lingvojn, estas permesata. Bonvole menciu pri la fonto kaj la originala lingvo (t.e. Esperanto aŭ la persa) kaj se eble, informu nin pri eldonaĵo en kiu aperis io de aŭ pri IRANA ESPERANTISTO aŭ/kaj sendu ciferecan kopion al ni.

به نام خداوند جان و خرد



فصل‌نامه‌ی پژوهشی - فرهنگی دوزبانه‌ی فارسی و اسپرانتو

دوره دوم، شماره سی‌وششم، زمستان ۱۳۹۹

شماره استاندارد بین‌المللی (ISSN):

۱۷۲۸-۶۱۷۴

تاریخ انتشار نخستین شماره: پاییز ۱۳۸۱

نقل مطالب مجله با ذکر منبع و ماخذ جایز است و از استفاده کنندگان درخواست می‌شود یک نسخه الکترونیکی یا تصویر از نشریه‌ای را که در آن مطلبی به نقل از این مجله درج شده است به نشانی اینترنتی مجله ارسال کنند.

مسئولیت مطالب مندرج در این مجله برعهده‌ی نویسندگان آن می‌باشد.

گرافیک و حروفچینی: سبزاندیشان

نشانی‌ها:

پایگاه اینترنتی: [www.espero.ir](http://www.espero.ir)

پست الکترونیک: [info@espero.ir](mailto:info@espero.ir)

### همکاران تحریریه این شماره:

- \* رولان پلاتو
- \* احمدرضا ممدوحی
- \* شلر کریمی
- \* امیر فکری
- \* کیهان صیادپور
- \* نازی صولت
- \* حمزه شفیع
- \* سیمین عمرانی
- \* علی مرادی

### Mallongigoj uzitaj en ĉi tiu numero

ILEK: Irana Literatura Esperanto Konkurso  
IrEA: Irana Esperanto-Asocio  
IrEJO: Irana Esperantista Junulara Organizo  
IrEK: Irana Esperanto-Kongreso  
IrLEI: Irana Ligo de Esperantistaj Instruistoj  
UK: Universala Kongreso

Irana Esperantisto  
akceptas anoncojn.

مجله سبزاندیشان آماده پذیرش آگهی می‌باشد.

### Kontribuantoj ĉi-numere:

- \* Roland Platteau
- \* Ahmad Reza Mamduhi
- \* Shlher Karimi
- \* Keyhan Sayadpour
- \* Nazi Solat
- \* Hamzeh Shafiee
- \* Amir Fekri
- \* Simin Emrani
- \* Ali Moradi



**Kovrila Paĝo:**  
Marjam Mirzajani  
**Lasta Paĝo:**  
Tombejo de Marjam Mirzajani


طرح روی جلد:  
مریم میرزاخانی  
طرح پشت جلد:  
آرامگاه مریم میرزاخانی



# En ĉi tiu numero:

# در این شماره:

- 4 Antaŭ ĉio..
- 5 Novaĵoj
- 6 Marjam Mirzaĥani  
Esperantigis: Behĝat Mamduhi
- 8 Pri Kronvirus-vakcino  
Intervjueto Kun D-ro Kejhan Sajjadpur
- 9 Angel Arquillos Lopez  
Tri Mallongaj poemoj
- 10 Reagoj  
Ricevitaj Mesaĝoj de niaj legantoj
- 12 Pri la Filmo “La Insulo de la Rozoj”  
Tradukis al la persa: Shler Karimi
- 14 Noara kaj Muziko  
Tradukis: Roland Platteau
- 16 Scienca Artikolo Pri Psikologio  
Tradukis: Ali Moradi
- 18 Veturoj kaj Memoraĵoj (1)  
Nazi Solat
- 24 Diversaĵoj  
Amir Fekri
- 28 Aventuroj de Pioniro (13)  
Tradukis al la persa: A. Fekri
- 30 Intervjuo  
Intervjuo kun Farshide Arabshahi
- 32 Paĝoj en la Kurda Lingvo  
Shler Karimi
- 36 Paĝoj en la Araba Lingvo  
Keyhan Sayadpur



- 4 قبل از هر چیز ...
- 5 اخبار
- 6 مریم میرزاخانی، ریاضیدان نابغه  
ترجمه به اسپرانتو: بهجت ممدوحی
- 8 سوالات متداول درباره واکسن کرونا  
مصاحبه با دکتر کیهان صیادپور
- 9 چند شعر کوتاه  
انگل آرکیلو لویز
- 10 بازتاب نظرات خوانندگان  
پیام‌های دریافتی در رابطه با محتوای مجله
- 12 نقد فیلم «جزیره گل‌های سرخ»  
ترجمه به فارسی: شلر کریمی
- 14 نوآرا و موسیقی  
رولان پلاتو
- 16 مقاله علمی روانشناسی  
ترجمه به اسپرانتو از علی مرادی
- 18 سفرها و خاطره‌ها (۱)  
نازی صولت
- 24 گوناگون  
امیر فکری
- 28 ماجراهای یک پیشتاز (۱۳)  
ترجمه: امیر فکری
- 30 مصاحبه  
گپ و گفت با فرشیده عربشاهی
- 32 صفحات کردی  
شلر کریمی
- 36 صفحات عربی  
کیهان صیادپور

### Antaŭ ĉio...

La ĉefa temo de tiu ĉi numero estas dediĉita al la karmemora matematikistino irana "Marjam Mirzähani" kiu bedaŭrinde forpasis nur 40-jaraĝe en 2017 pro kancero. Nia du-paĝa artikolo estas ŝia prezenteto okaze de ŝia naskiĝdat-reveno (la 12-an de Majo) kiu estas nomita per la "Internacia Ligo de la Mondaj Asocioj de Matematiko" kiel la "Internacia tago de Virinoj en Matematiko".

Meze de aprilo okazos la 8-a Irana Esperanto-Kongreso (IrEK-8). La kongreso okazos virtuale same kiel pasintjare. IrEA invitas iranajn kaj eksterlandajn esperantistojn por aktive partopreni en plibona aranĝado kaj prezentado de tiu ĉi grava ĉiujara kunveno.

Reagoj de legantoj pri la enhavo de la revuo estas tre dezirindaj kaj alloga parto kaj por legantoj kaj por redaktantoj de la revuo. En tiu ĉi numero vi legos kelkajn tiajn reagojn. Ankaŭ vi bv. skribu vian opinion pri la revuo.

Via, Hamzeh Shafiee

### قبل از هر چیز...

مقاله اصلی این شماره به بزرگداشت مریم میرزاخانی نابغه بزرگ ریاضی کشورمان اختصاص یافته است. با توجه به نزدیک بودن سالروز تولد ایشان بیست و دوم اردیبهشت (دوازدهم مه) که از سوی اتحادیه بین‌المللی انجمن‌های ریاضی جهان به عنوان روز جهانی زن در ریاضیات نام‌گذاری شده است این مقاله می‌تواند در معرفی این بانوی دانشمند و تجلیل از ایشان مفید واقع شود.

این شماره از مجله در حالی منتشر می‌شود که برنامه‌ریزی برای برگزاری هرچه بهتر هشتمین همایش اسپرانتوی ایران در دست انجام است. قطعاً بدون هم‌یاری اسپرانتودانان داخلی و خارجی نمی‌توان انتظار یک همایش پر بار و به‌یادماندنی را داشت، لذا از همگان تقاضا داریم تا با حضور خود در این رویداد منحصر به فرد سالانه، در اعتلای سطح فعالیت‌های اسپرانتو در کشورمان نقشی موثر داشته باشند. منتظر دریافت پیشنهادات و نظرات شما در راستای برگزاری یک همایش باشکوه و عالی هستیم.

ارادتمند، حمزه شفیعی

Irana Esperanto-Asocio (IrEA) anoncas okazigon de la oka IrEK (Irana Esperanto-Kongreso) de la 8-a ĝis la 11-a de aprilo 2021. Jen estas ĉiujara unika okazaĵo por ĝui la esperantan etoson kun abundaj programeroj.



La 8-a Irana Esperanto-Kongreso  
8-11 Aprilo 2021

La ĉi-jara kongresa temo:

### Virtuala mondo, reala espero

En la programo estas antaŭplanita, krom seminarioj, prelegoj kaj diskut-rondoj, ankaŭ kulturaj aranĝoj kiel arta vespero kaj muzik-prezentoj. Same kiel pasinta IrEK, okazos AMO-Seminario kadre de la kongreso.

Estas bonvenaj viaj kontribuoj pere de artikoloj, prezentoj kaj aktiva partopreno en aranĝado kaj pliallogigo de la okazaĵo. Skribu al: [info@espero.ir](mailto:info@espero.ir)



هشتمین همایش اسپرانتو ایران  
۱۹ الی ۲۲ فروردین ۱۴۰۰

موسسه سیزاندیشان افتخار دارد شما را به حضور در هشتمین همایش زبان اسپرانتو که در روزهای ۱۹ تا ۲۲ فروردین ۱۴۰۰ به صورت مجازی برگزار می‌شود دعوت نماید.

موضوع اصلی همایش امسال:  
**دنیای مجازی، امید واقعی**

در برنامه‌ی همایش امسال، علاوه بر سخنرانی، سمینار و بحث آزاد، برنامه‌های فرهنگی و هنری نیز پیش‌بینی شده است. همچون همایش هفتم، سمینار پرورشی فعالان اسپرانتو (AMO-Seminario) نیز در برنامه گنجانده شده است.

مقالات، پیشنهادات و نظرات خود را برای هرچه پربارتر نمودن این همایش بزرگ به آدرس ایمیل [info@espero.ir](mailto:info@espero.ir) ارسال نمایید.


## Baztab gسترده و مثبت فعاليت‌های اسپرانتوی ایران در رسانه‌های پرمخاطب جهان

# Irana Esperanto-agado bone prezentita mondscale

Jen Esperanta versio de letero, kiun Germain Pirlot sendis en la franca al belgaj ĵurnaloj:

La pandemio malebligas ankaŭ internaciajn kunvenojn; multaj el ili estis nuligitaj pro la neeblo organizi ilin kiel antaŭe. Iuj estis anstataŭigitaj de virtualaj, kun iuj pozitivaj punktoj. Ekzemple, la tutsemajna kongreso de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo), kiu devis okazi en 2020 en Nederlando, havis pli ol trioblo da partoprenantoj ol kutime, inkluzive junajn azianojn kaj afrikanojn, kiuj ne povus pagi la vojaĝon kaj la restadon de semajno por kutimaj kongresoj.

Alia ekzemplo estas tiu de universitataj retseminarioj organizitaj en Irano kun pli da eksterlandaj universitataj profesoroj – ekz-e el Usono, Germanio, Italio, Hispanio, Ĉinio, Kanado, ... La unua okazis la 22-an de oktobro 2020 en la Universitato de Mazandarano, unu el la plej grandaj iranaj ŝtataj universitatoj, norde de Irano. Konsiderante la sukceson atingitan, la direktoro de la Oficejo por Sciencaj kaj Internaciaj Kunlaboroj spontanee proponis bakalaŭran programon por Esperanto. La dua okazis en la Universitato de Ŝirazo, meze de Irano. Ĉi tiuj du universitatoj estas inter la plej malnovaj kaj famaj ŝtataj universitatoj en la lando. Traduko al la persa sekvis la paroladojn en Esperanto. Poste la profesoroj kaj la studentoj povis, per dudirekta tradukado, fari demandojn kaj ricevi la respondojn perse.




be denbal brgkzari vbinarhay mcrfy asprantio dr دانشگاه‌های مازندران و شیراز که در آنها علاوه بر اسپرانتودانان ایرانی، اسپرانتودانان برجسته‌ای از کشورهای مختلف مانند چین، آمریکا، اسپانیا، ای‌تالیا و آلمان به معرفی و ارایه مطلب درباره زبان اسپرانتو و کاربردهای علمی و عملی آن پرداختند، چندین نشریه معتبر نیز این خبر را در سطح جهان بازتاب داده و گزارش‌هایی در انعکاس این رویداد منتشر نمودند. چند نمونه کوچک از این بازتاب‌ها در زیر معرفی شده است.

مجله «اسپرانتو»، ارگان رسمی «سازمان جهانی اسپرانتو» که ۱۱۴ سال است که در حال انتشار می باشد، در شماره دسامبر ۲۰۲۰ خود، گزارشی نیم‌صفحه‌ای درباره وبینار سه‌روزه دانشگاه شیراز همراه با پوستر این رویداد منتشر نموده و در آن به اسپرانتودانان ایرانی به خاطر این موفقیت و دستاورد بزرگ تبریک گفته است. یادآوری می‌شود که در وبینار مذکور هشت اسپرانتودان نام‌آور که سال‌ها در دانشگاه‌ها و سازمان‌های بین‌المللی فعالیت نموده‌اند و یا در دانشگاه هاروارد، دانشگاه هریوت-وات و دانشگاه رم دانش آموخته‌اند و/یا دارای کرسی می‌باشند در مدت سه روز به سخنرانی و معرفی اسپرانتو پرداختند.

بولتن خبری «اسپرانتو در آسیا و اقیانوسیه» نیز در آخرین شماره خود در گزارشی چند صفحه‌ای به فعالیت‌های اسپرانتو در ایران پرداخته که بخشی از این گزارش به سمینارهای متعدد معرفی اسپرانتو اختصاص یافته است.

آقای ژرمن پیرلو (Germain Pirlot) اسپرانتودان معروف، در گزارشی که به زبان فرانسه تهیه کرده و به نشریات متعددی در بلژیک ارسال نموده است، برگزاری وبینارهای معرفی اسپرانتو در ایران را الگویی مثال‌زدنی برای سایر کشورها برشمرده که در دوران پاندمی به بهترین وجه توانسته جایگزین گردهمایی‌ها و همایش‌های حضوری باشد. ترجمه متن گزارش مذکور به زبان اسپرانتو در ستون مقابل درج شده است.



Marjam Mirzaĥani, genia irana matematikistino, universitata profesorino en Stanford-universitato, gajninto de Fields- kaj Blumenthal-medaloj, naskiĝis la 12an de majo 1977 en Tehrano, la ĉefurbo de Irano.

Marjam de sia infanaĝo estis tre inteligenta, kaj post fino de sia elementa edukado, rekonigis kiel brila talento, kaj partoprenis enir-ekzamenon por la plej bonaj mezlernejoj, kaj sukcesis eniri tehranan mezlernejon Farzanegan. En 1994, nur 15-jaraĝa, ŝi sukcesis akiri la oran olimpiadan medalon de Hongkongo ĉar ŝi ricevis 41 poentojn el 42 poentoj. Post nelonge en 16-jaraĝo, en 1995 kun plena poentaro kaj unua rango, ŝi revenis sian landon kun la olimpiada matematika medalo el Kanado. Marjam estis la unua irana virino, kiu trovis sin en la irana matematika olimpiado kaj ricevis du orajn medalojn.

Ŝia patro, Ahmad Mirzaĥani devenis de Talegano, en Alborz-provinco de Irano. Li estis inĝeniero pri elektroniko kaj la ĉefo de estraro de edukada kaj bonfarada asocio, nomata Ra'd.

Marjam havis tri gefratojn, kaj iliaj gepatroj neniel devigis ilin al studado, kvankam ili esperis, ke la gefiloj estu kaj valoraj kaj gravaj homoj por la socio. Tiu, kiu ĉefe kaŭzis, ke Marjam entuziasmiĝis pri matematiko, estis lia frato.

Dum la studado, Marjam konatiĝis kun Ro'ja Beheŝti, kiu estis ŝia intima amikino, kaj la nurulo, kiu ĉiam subtenis ŝian motivon. Ankaŭ ŝia lekciistino estis tre efika en la vivo de Marjam. Laŭ la lekciistino, same kiel knaboj, ankaŭ knabinoj povis kaj devis profiti la favorajn kondiĉojn por

ĉiama strebado por sukcesiĝo.

Mirzaĥani ege intresiĝis al legado, laŭ ŝia diro, ŝia plej bona kaj plej ekscita ŝatokupo estis legado de romanoj. Cetere ekde la infanaĝo ŝi tre ŝatis verki, kaj tiam ŝia revo estis verkistiĝi.

Mirzaĥani ricevis sian licencion de Ŝarif Teknologia Universitato en Tehrano, kaj en 1999 sian magistrecon de la sama universitato en la fakultato pri matematiko. Ŝi kune kun Ro'ja Beheŝti, estis la unuaj virinoj, kiuj trovis vojon al la Irana Matematika Olimpiado. Post nelonge, Marjam iris al Usono kaj studis tie, kaj en 2004 doktoriĝis ĉe Harvard-Universitato kun gvidado de prof. Curtis T. McMullen, kiu mem estis gajninto de Fields-medalo. En 2005 Mirzaĥani elektiĝis kiel unu el 10 mondaj junaj plej superaj homoj en la matematika fako.

Marjam en 2008 geedziĝis kun Jan Vondrák de Ĉeĥio. Li estis asista profesoro ĉe la Stanford Universitato. Ilia filino nomiĝas Anahita.

En 1997 aŭtobuso transportis geniajn matematikistojn al Ahvaz-urbo por partopreni en la 22a studenta konkurso, sed kiam la buso estis revenanta al Tehrano havis akcidenton kaj bedaŭrinde falis en valon. La teamo kiu unuarangiĝis, inkluzivis Marjam Mirzaĥani, Iman Efteĥari kaj Hosejn Namazi. En tiu terura akcidento, ses eminentaj studentoj, kiuj ofte estis elektitaj por la naciaj kaj internaciaj matematikaj olimpiadoj, bedaŭrinde forpasis. Unu el pluvivantaj, estis Mirzaĥani, kiu tiam estis 20-jaraĝa. Ŝi estis la unua virino kaj unua iranano, kiu gajnis Fields-medalon, kiu estas kvazaŭ Nobel-premio en matematika

tereno. Ŝi ankaŭ sukcesis akiri Blumenthal-, kaj Satter-medalojn, kiuj estas la plej superaj kaj plej honorigaj sciencaj premioj en la mondo.

Ŝiaj esploroj i.a. estis pri geometrio de surfacaj, kaj spiala geometrio.

Mirzaĥani ekde 2008 instruis kaj esploris en Stanford Universitato kaj Princeton Universitato.

La naskiĝtago de Marjam Mirzaĥani, la 12a de majo, flanke de la Internacia Ligo de la Mondaj Asocioj pri Matematiko nomiĝis La Monda Virina Tago de Matematiko.

En julio de 2017 Marjam enlitiĝis en usonan hospitalon pro kancero kaj ŝiaj gepatroj iris tien por prizorgi ŝin. Kvar jarojn antaŭ tio ŝi ekhavis mamkanceron, kiu atingis al ŝia ostmedolo. En la 13-a de julio de la sama jaro ŝi forpasis en la hospitalo, kiam ŝi estis nur 40-jara. Pacon al ŝi!

### Honorigoj kaj premioj

- La Biblioteko de la Fakultato pri Matematiko en la Ŝarif Teknologia Universitato nomiĝas Marjam Mirzaĥani.



- Laŭ la decido de membroj de asocioj en Monpeliero (Francio) ŝia nomo estis elektita por unu el la stratoj tie.



- Laŭ propono de studentoj de la Teknika Universitato de Berlino en la Virina Tago (la 8-an de marto) unu el la stratoj en Berlino, eknomiĝis Marjam Mirzaĥani.
- Institucio de Virinoj en la Unuiĝintaj Nacioj en 2019 inter sep plej influaj virinoj de la mondo, prezentis ŝin.
- Ora medalo de la monda matematika olimpiado (HongKongo) 1994.
- Ora medalo de la monda matematika olimpiado (kun plena poento) (Kanado) 1995
- Kunlaboranto de la Esploroj pri Fundamentaj Sciencoj, Tehrano, Irano, ekde 1995 ĝis 1999.
- Honoriga premio de la Harvard Universitato 2003.
- Premio de plej bona esploristo de la Fondaĵo pri la ĝenerala matematiko 2004.
- AMS-premio de Blumenthal en 2009
- SETR-premio de la Usona Asocia pri matematiko en 2013
- Elektita kiel unu el la dek gravuloj en 2014 flanke de la revuo Nature
- Fields-medalo de Seulo en 2014



- Membreco en la Franca Akademio de Sciencoj en 2015
- Membreco en la Usona Societo de Filozofioj en 2015
- Membreco en la Usona Nacia Akademio de Sciencoj en 2016
- Membreco en la Usona Akademio de Artoj kaj Sciencoj en 2017

# Oftaj Demandoj pri kronvirus-vakcino

Intervjueto Kun D-ro Keyhan Sayadpour

## El kio konsistas kronvirus-vakcino?

Ĝenerale estas tri formoj de kronvirus-vakcino. Unu estas bazita sur nova teknologio, nomata mRNA vakcinoj. En tiu formo, oni injektas mRNA-n kiu en la korpo produktas parton de la viruso. La korpo ekkonas la parton fremdan kaj kreas imunecon kontraŭ tio. Tiuj vakcinoj povas esti ĝis 90% efikaj sed ili estas multekostaj. La dua formo estas fakte senaktiva adenoviruso kiu produktas materialojn de kronviruso. Ili estas malpli efikaj ol la unuaj.

Alia formo estas bazita sur senaktivigita viruso, malnova teknologio, pli malpli 50% efika, kaj malpli kosta.

## Ĉu ĝi estas sendanĝera kaj havas kromefikojn?

Ĉiu vakcino povas havi danĝeron aŭ kromefikon. Sed kompare al la avantaĝoj, tiuj problemoj estas malgravaj. mRNA vakcino estas relative nova kaj

malpli konata. Longdaŭraj kromefikoj ne estas konataj.

## Ĉu per unufoja ricevo kronvirus-vakcino imunigas onin kontraŭ la malsano?

Nun oni devas havi 2 injektojn. Plej probable pliaj injektoj estos bezonataj. Kompreneble tio dependas ĉu daŭros la pandemio aŭ ne.

## Ĉu post vakcinado oni ne plu malsaniĝos?

Kiel mi diris la efiko ne estas 100%, do oni devas atenti. La risko de malsano multe malpliĝas sed ne malaperas.

## Ĉu post vakcinado oni portu maskon en publikaj lokoj kaj sekvu la instrukciojn kaj socian distancon? Alivorte, ĉu la vakcino tuj efikos? Aŭ oni devas atendi kelkajn tagojn aŭ semajnojn?

Oni devas atendi ĝis iom da tempo pasos post la dua injekto (1-2 semajnojn). La respondo pri la masko estas malfacila. Estas bone ke homoj portu la maskon ĉar unue ili povas porti la viruson kaj infekti aliajn, due ĉar ankoraŭ estas risko por ili mem. Alivorte vakcino ne estas por forĵeti la maskon, sed por ne suferi pro malsano kaj ne morti.

## Ĉu ankaŭ resaniĝintoj devas ricevi vakcinon?

Ĝenerala rekomendo estas jes. Ĉar oni ne povas fidi ke la malsaniĝo donas longan imunecon.

## Ĉu oni devas ĉiujare ricevi vakcinon de kronviruso? Se jes, kiomfoje?

Ankoraŭ oni ne scias la respondon. Plejeble pliaj dozoj estos bezonataj. La ofteco ne estas sciata ankoraŭ.

## Ĉu vakcinita persono povas infekti la nevakcinitan personon?

La du unuaj formoj de vakcino ne infektas. Tiuj post senaktivigita viruso povas sed tiu viruso estas danĝera nur por homoj kun imun-problemo. Ambaŭ bedaŭrinde povas porti la realan viruson kaj transdoni al la aliaj sen malsano.





# Angel Arquillos Lopez



## Kion mi faru?

Kion mi faru, Dio?  
 ĉar mia viv' finiĝas,  
 mi kuŝas ĉe l' abismo  
 kaj kun angoro spiras.  
 La forto de l' silento  
 kaj timo min lacigas  
 montranta la pasinton,  
 kiu min tre timigas.  
 Kion mi faru Dio?  
 ĉar mia viv' finiĝas.

Arquillos, novembro 2020

## Soleca ĉarmo

Hodiaŭ mi vekiĝis trista  
 kun la soleco kutima  
 ĉe mia malgranda ĉambro.  
 Ĉio preskaŭ ĉiam nigras  
 kun la malhelo kutima  
 kaj la foresto de amo.  
 Nur mia vizaĝo brilas,  
 pro la ŝvitado senfina  
 kaj du malkonvenaj larmoj.  
 Kun angoro mi sopiras  
 kaj kun trankvilo mi miras  
 la bonecon de la kalmo.  
 Hodiaŭ mi vekiĝis trista,  
 sed la soleco kutima  
 montris nekutiman ĉarmon.

Arquillos, novembro 2020

Paroli kun vi denove,  
 eble jam ne havas sencon,  
 ĉar vi estas nur memoro...  
 Se mi aŭdus vian voĉon,  
 tute certe mi ekkrius  
 petante vian revenon,  
 sed via voĉo mutiĝis,  
 kiel la tagoj mutiĝas,  
 kiel kandeloj fandiĝas,  
 kiel la viv' finiĝas...

Arquillos, marto 2018

Karaj samideanoj!

Dank' al EKO (ILEI k. UEA)-mesaĝo mi malkovris vian bel- kaj modern-aspektan revuon kun interesaj kaj diversspecaj artikoloj. Estontece mi intencas kontribui per propaj artikoloj, ... se vi konsentas!

Tamen mi havas jam pretan tekston pri relativa nova fakgrupo en Esperantujo, nekonata en Irano, mi supozas.

Fakte, la revuo "Esperanta Numismatiko" estas sendata al 145 individuaj membroj en 44 landoj en la mondo, bedaŭrinde ĝis nun NE al Irano! Krome sendata al 22 asocioj (el ili diversaj esperantaj muzeoj, bibliotekoj kaj universitatoj) bedaŭrinde NE al Irano!

Por ŝanĝi tiun situacion mi nun aldonas artikolon pri ENA kaj kiel SENPAGE aboni! Mi do petas vin publikigi la varbilon en via revuo.

Mi antaŭdankas vin kaj deziras al via redakcio sukceson por via altnivela bulteno!

Samideane kaj numismate,

Mag.Fil. Bert Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

Fakdelegito pri numismatiko

آرزوها و دعاهاي خانم ميريوبراي سال نو  
ميلادي:

- «کرونا» دوباره نام نوشيدنی باشد،
  - ما شجاعانه پيش رويم، نه اينکه جدا ازهم عقب برويم،
  - لغت مثبت، دوباره معنای مثبت خودش را بيايد، (نه اينکه پاسخ آزمایش بيماری باشد)
  - آزمایش ها دوباره در کلاسها برگزار شوند
  - جداسازی / ايزوله کردن مربوط به کابلها و خانهها شود
  - ماسکها فقط در کارناوالها استفاده شوند
  - و «دونالد/دانلد» دوباره همان غاز آوازه خوان باشد!(اشاره به شخصيت کارتونی «دانلد داک» و نام رييس جمهور آمريکا و آرزوی عدم پیروزی او در آمريکا. م.)
- اصل متن ایمیل حاوی دعاهاي ميريوب:

- ke Corona estu ree biero
- ke ni iru kuraĝe antaŭen, ne distancige malantaŭen
- ke la vorto *pozitiva* havu ree pozitivan signifon
- ke testoj okazu ree en lernejoj
- ke izoliĝo ree koncernu kablojn kaj domojn
- ke maskoj aperu nur en karnavaloj
- kaj ke Donald estu ree blekanta anaso

## Esperanto-Numismatika Asocio



Estimata samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable ununura fakgrupo "Esperanto-Numismatika Asocio" (ENA) kun revuo "Esperanta Numismatiko" en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol ses jaroj ĝis 145 individuaj membroj kaj 22 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: "Mi konsentas aliĝi"). Krome la NUR PERRETA revuo estas ankaŭ tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, ni klarigos kiel vi povas (ne devas!) elŝuti la jam aperintajn numerojn. SENPETE sekve vi ricevos ĉiujn novajn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

**Vi krome rajtas unue peti provnumeron!**

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

bert.boon@skynet.be



# Reagoj

La pagôj pri angel Arquillos estas tre bonaj!  
kaj liaj poemoj tre bele kaj trafe prezentitaj,  
dankon!

Ankaŭ rilate al la Iraka recepto, vi trovis  
belan foton de ĝi!

La tekstoj pri la naskiĝo de Putin, kaj tiu pri  
la morto de Antoine de Saint-Exupery (mi tre  
ŝatas tiun aŭtoron, ĉefe lian libron "Tero de la  
homoj") estas impresaj!

La revuo "Irana Esperantisto" decidis aperigi  
artikolojn en minoritataj lingvoj de Irano. En  
la aŭtuna numero aperis artikoloj en la araba  
kaj kurda lingvoj.

Tre bona iniciato! (des pli, ke mi memoras,  
ke iam venis en Arras irana esperantisto, al  
kiu mi demandis pri la lingvoj de Irano, kaj  
kiu respondis firme "la persa, estas nur la  
persa, neniŭ alia", dum mi jam bone sciis, ke  
estas parolataj en Irano multaj aliaj lingvoj,  
mi mem havis, kiel plejunuan esperantan  
konrespondanton iun el Azerbajĝano.)

Resume, kvankam mi ne jam ĉion legis, tiu  
numero 35 donas al mi bonegan impreson!

Ĝis!

R. Platteau

P.S: Mi sendas al vi mian tradukon de teksto  
tirita el libro de Elian-J. Finnert. Se interesas  
vin mi havas plian tekston pri tiu simiino,  
kiu estis tre amata de li dum lia tuta infaneco  
kaj juneco. Eble, se vi publikigos la tekston  
vi bezonos prezenton de la aŭtoro kaj de la  
simiino, diru al mi, mi serĉos, mi devas havi  
iun.

Cetere mi esperantigis plenan libron de li, kiu  
aperis ĉe MAS: "La plej belaj rakontoj pri  
hundoj". (jam estas prezento pri li en la libro)

## Mallongaj Elektitaj Ĉitaĵoj

- Unu mensogo povas detruŭ la rezulton de jaroj da honesteco.
- La plej severa instruisto en la vivo estas sperto, kiu unue faras ekzamenon kaj poste instruas.
- Ne petu Dion doni al vi la tutan mondon, petu Dion doni al vi iun, kiu preferas vin al la tuta mondo.
- Mi ankoraŭ ne scias, ke la jaro, kiu pasas, ĉu aldonas unu jaron al mia vivo aŭ forprenas unu jaron de mia vivo. Gandhi
- Neniŭ povus pruvi amikecon krom la paso de tempo kaj ludoj de la tempo.
- Ni multe pensas kaj sentas malmulte. Ĉarli Ĉaplin
- La vivo konsistas el du duonoj, la unua duono estas la deziro al la dua duono kaj la dua duono estas la sopiro al la unua duono.
- Pomo falis kaj la mondo ekkonsciis pri gravito, milionoj da kadavroj falis sed homoj ne komprenis la homecon. Ĉarli Ĉaplin
- Por pli bone koni homojn, sufiĉas unufoje agi kontraŭ ilia volo.
- Timu vian malamikon nur unufoje, vian amikon milfoje.
- Esti homo, mem estas specifa religio, kiu ne havas multajn sekvantojn. Gandhi
- Se vi estas feliĉa, ridu mallaŭte kaj se vi malĝojas, ploru laŭte.
- Kiam la vivo montras al vi cent kialojn por plori, vi havas mil kialojn por ridi. Ĉarli Ĉaplin
- Neniŭ almozpetu amon, ĉar oni ne donas ion valoran al almozpetanto.
- Unu el la plej favorataj diservoj estas ne ofendi aliajn.
- Rompu la muron de l' Kaabo sed ne rompu ies koron, Ĥalil konstruis ties muron sed Dio la koron.
- Kiam valoroj ŝanĝiĝas, hundinoj fariĝas valoraj.



## نقدی بر فیلم "جزیره‌ی گل‌های سرخ"

فدریکو گوبو، استاد بین‌زبان‌شناسی (زبان‌شناسی زبان‌های فراساخته) و اسپرانتوشناسی دانشگاه آمستردام در هلند، معتقد است که نتفلیکس تنها با یک فیلم، تاثیرگذارتر از هزاران کنفرانس وجود اسپرانتو را معرفی می‌کند. او فیلم جدید را در مورد "جزیره‌ی گل‌های سرخ" که در آن زبان اسپرانتو تنها در حاشیه ظاهر می‌شود، دیده است.

تلاش اصلی اسپرانتو از زمان شکل‌گیری‌اش، این بوده است که توسط دنیای بیرونی به عنوان یک واقعیت اجتماعی مستقل، متکی به خود و به نوعی معتبر، به رسمیت شناخته شود. در کل، سخنان پیشگامان اسپرانتو درباره‌ی «پیروزی نهائی» اسپرانتو و آن چشم‌انداز رنگارنگی که مجمع‌الجزایر رومیسم را تشکیل می‌دهد بسیار شبیه هم‌دیگرند.

ساده‌سازی یک مسئله‌ی پیچیده‌ی جامعه‌شناسی، شعارهای "اسپرانتو، زبان دوم همه باها!" و "به اسپرانتستان مانند یک کشور احترام بگذارید"، این حسرت مشترک را در مورد کسب به رسمیت شناختن به هم گره می‌زند. برای اینکه اسپرانتو به این به رسمیت شناخته شدن دست پیدا کند، عموم مردم جهان (همگان) باید به وجود اسپرانتو پی ببرند نه اینکه لزوماً خود زبان را بشناسند. حتی شناختن آن بهتر است چون شخص به گونه‌ای واضح و بدون هرگونه شک و تردیدی در این کشور بدون قلمرو، که ما آن را اسپرانتستان می‌نامیم، خارجی و بیگانه است.

در تاریخ اسپرانتو دست کم دو قسمت وجود دارد که بخش اصلی آن جنبش اسپرانتو است اما بخشی که گسترده‌تر از آن است، بخشی است که در آن آدمها می‌خواستند اسپرانتو را به عنوان پرچم زبانی دولتهای کوچک خود بدون پشتیبانی متمایز جنبش اسپرانتو- در تملک خود بگیرند. مهمترین قسمت، «مورسنتوی بی‌طرف» است که ترجمه‌ی اسپرانتو از کتابچه‌ای که به طور خلاصه تاریخ جذاب آن را ارائه می‌دهد، درباره‌اش وجود دارد. عنوان آن «زینکو» است

در ۹ دسامبر ۲۰۲۰، در صفحه‌ی مجازی نتفلیکس، فیلمی ایتالیایی‌زبان در مورد "جزیره‌ی گل‌های سرخ" کشور-جزیره‌ای ساختگی که زبان رسمی آن اسپرانتو بود، نمایش داده شد. مشخص نیست آیا فیلم در کل نقش اسپرانتو را به خوبی بیان کرده است یا نه.

جزیره‌ی گل‌های سرخ، جزیره‌ای ساختگی در دریای آدریاتیک در ساحل ایتالیا، ۱۲ کیلومتری ریمینی بود که در آن یک دولت مستقل اعلام کردند. "اسپرانتو" زبان رسمی این کشور جدید بود که در سال ۱۹۶۸ به مدت چند هفته وجود داشت.

چند هفته بعد از اعلام دولت جدید، در پایان ژوئن ۱۹۶۸، پلیس ایتالیا جزیره را اشغال کرد. بعدها در ۱۱ تا ۱۳ فوریه ۱۹۶۹ از طریق نیروی دریایی ایتالیا به وسیله مواد منفجره، سکویی که جزیره بر روی آن قرار داشت، تخریب شد.

مجله‌ی اسپرانتو درباره‌ی سرنوشت پروژه در سه مقاله در ۱۹۶۸ و ۱۹۶۹ گزارش‌هایی منتشر کرد. در مارس ۲۰۱۷، مجله اینترنتی «برگ آزاد» به مناسبت درگذشت بنیانگذار آن جورجیو روزا گزارشی تهیه کرد.

اکنون سرویس تلویزیون اینترنتی جهانی آمریکا، نتفلیکس، فیلمی ایتالیایی در مورد "جزیره‌ی گل‌های سرخ" ساخته است.

فیلم در ۹ دسامبر پخش شد، طبق آنونس فیلم، موضوع فیلم درباره‌ی مهندس آرمان‌گرایی است که در ساحل ایتالیا جزیره‌ی شخصی خودش را بنیان می‌نهد و در آن دولتی مستقل اعلام می‌کند. "اکنون، هنگامی که حکومت ایتالیا دشمنی خودش را اعلام می‌کند ارزش‌ها بطور کامل محک خورده‌اند، اما برای تغییر جهان باید خطر کرد."

بنابر مقاله‌ی بی‌بی‌سی، جورجیو روزا قبل از مرگش کارگردان فیلم را ملاقات کرد و بعد از مقداری ترغیب و تشویق موافقت خود را با طرح اکران داستانش اعلام کرد. مضمون فیلم درباره‌ی ساخت جزیره و خودداری جورجیو روزا از پذیرش درخواست دولت ایتالیا برای نابود ساختن جزیره است.

بنابر نظر ماتیو رور، تهیه‌ی کننده‌ی فیلم مذکور در همان مقاله‌ی بی‌بی‌سی، فیلم در واقع حکایت آزادی است. اما جورجیو روزا در اصل برای راه‌حلی که او برای ساختن جزیره‌ی خودش اختراع می‌کرد، به خود می‌بالید.

«در حقیقت وقتی با او صحبت کردیم، او زیاد به داستان خودش علاقه‌مند نبود. اما مشتاقانه در مورد تکنولوژی‌ای که برای ساخت آن ابداع کرده بود، صحبت می‌کرد.»

منبع:

مجله‌ی اینترنتی برگ آزاد (Libera folio) - ۲۰۲۰/۱۲/۷

اسپرانتو را معرفی می‌کند.

به همین خاطر نگاه مداراگر خود را به جنبه‌های فوق که برای آشنایان جزئیات تاریخی زندگی جرجیو روزا چشمگیر است، بدوزیم؛ خواننده‌ی کنجکاو می‌تواند فیلم مستند چند سال قبل تهیه شده توسط سینماتک را در یوتیوب و به صورت کاملاً رایگان و با دوبله‌ی خوب و (باکیفیت) اسپرانتو، مشاهده کند.

برجستگی در موضوع فیلم به کارگردانی سیدنی سبیلیا روایت کردن اقدام دیوانه‌وار یک قهرمان هوبریس‌وار است که سرنوشتش نمی‌تواند چیزی غیر از شکست باشد و دقیقاً به همین خاطر قهرمان داستان دلسوزی بیننده را به خود جذب می‌کند و همراه با او، کاملاً طبیعی، اتحاد او را با اسپرانتو، (بیننده با قهرمان داستان و اتحاد او با اسپرانتو همذات پنداری می‌کند.)

فدریکو گوبو

منبع: مجله‌ی اینترنتی برگ آزاد (Libera folio) – ۲۰۲۰/۱۲/۱۱



- raŭmistoĵ: راومیسیم ایدئولوژی‌ای است که از مانیفست راوما (۱۹۸۰) نشأت گرفته است. این مانیفست اهداف جنبش سنتی اسپرانتو را مورد انتقاد قرار داده و جامعه اسپرانتو را «متعلق به یک اقلیت زبانی دیاسپورا که خود انتخاب می‌شود» تعریف کرده است. انتقاد از «اهداف اولیه» در مانیفست ادعا می‌نماید که «رسمی شدن اسپرانتو در دهه ۱۹۸۰ نه محتمل است و نه ضروری» و «سقوط زبان انگلیسی نه وظیفه است و نه دغدغه اسپرانتیست‌ها»

- در اساطیر یونان، «Hibris» یا «Υβρις» (Hubris) خدایی بود که گناه غرور را متبلور می‌کرد.

که نویسنده‌ی مشهور هلندی زبان، دیوید وان ریبروک، آن را تالیف نموده است.

قسمت دوم «جزیره‌ی گل‌های سرخ» است. سکویی که در قلمرو بین المللی دریای آدریاتیک ساخته شده است مقابل ساحل ریمینی، شهری ایتالیایی که در آن اسپرانتو ضمناً از طریق موزاییک‌های عبادتگاه‌ها منظره را تقسیم می‌کند. اما جزیره‌ی گل‌های سرخ اصلاً به مکتب کاتولیک یا مذهب ارتباطی ندارد. حتی کاملاً برعکس. موضوع هوبریس است، نوعی چالش - مدل مردانه - در برابر نظم طبیعت، گونه‌ای نماد خدایان یونان، جسور و شکننده‌ی قوانین. یا دست کم این تعبیر سیدنی سبیلیا، کارگردان فیلم ایتالیایی "داستان باورنکردنی جزیره‌ی گل‌های سرخ" است.

در سال ۱۹۶۸، زمانی که جوانان وقت هوبریسانه جرات کردند نظم برقرار شده را به چالش بکشند و تلاش کردند جهان را تغییر بدهند، مهندس جورجیو روزا تعصب حکومت ایتالیا را که تحت حمایت واتیکان بود به چالش کشید، با این هدف که جزیره‌ای که او در آدریاتیک ساخته جایی برای آزادی و عقاید شخصی بدون قفس‌های اخلاقی و دیوان‌سالاری باشد. برای درخواست از سازمان ملل متحد برای به رسمیت شناختن به عنوان دولت (خرد) به قلمرو، پرچم، پول، تمبر و البته زبان رسمی نیاز است. در فیلم، نقش اسپرانتو در چند لحظه به رسمیت شناخته می‌شود. به شیوه‌ی دیداری، نوشته‌های «جزیره‌ی گل‌های سرخ» و ظواهر روزنامه‌های ایتالیایی و غیرایتالیایی که واژه‌ی «اسپرانتو» را در عنوان مقالات ذکر می‌کنند، به شیوه‌ی شنیداری، از طریق دو گفتگو در دو لحظه‌ی نقطه عطف خود فیلم.

نمی‌خواهم فیلم را لو دهیم، پس فرصت دیدنش را به شما می‌دهم. فیلم ایتالیایی فقط به معنی ایتالیایی بودن فیلم است. این فیلم به زبان‌های انگلیسی، فرانسه، آلمانی و اسپانیایی دوبله شده و زیرنویس آن به زبان‌های مختلفی وجود دارد. سیاست زبانی نت فلیکس توسط نت فلیکس انتخاب می‌شود نه اسپرانتیست‌ها. این بدین معنی است که موضوع فیلم اسپرانتو نیست اما اسپرانتو جزئی از مضمون فیلم است.

آیا این از جذابیت دیدن فیلم می‌کاهد؟ به نظر من نه، (در فیلم) به اسپرانتو فقط اشاره‌های کوتاهی شده است پس مقداری رمزآلود است و این بطور اجتناب‌ناپذیری شعله‌ی کنجکاو را در غیر اسپرانتیست‌هایی که از دیدن فیلم لذت می‌برند، برافروخته می‌کند.

نشان دادن چند نکته‌ی جالب در مورد اسپرانتو به جای توضیح اسپرانتو، استراتژی بسیار موثرتری برای این برافروختگی است. این برافروختگی بدین معنی نیست که شعله مطمئناً مدت زیادی زنده خواهد بود به همین منظور قطعاً به برافروختنی که برای مدت طولانی‌تر از خود فیلم، حس کنجکاو را زنده نگه دارد، نیاز خواهد بود. اکنون نتفلیکس با یک فیلم بسیار موثرتر از هزاران کنفرانس وجود

# feliĉaj horoj de nun mortinta familio



El la libro de Elia-J. FINBERT, kiun li verkis pri sia simiino Noara

(Ni estas komence de la 20-a jarcento en malgranda urbo de Malalta Egipto: Minet-el-Gamh)

## Noara kaj muziko

Obsedatis ŝi de la piano en la salono. Ekde kiam mia patrino malfermis ĝin, tien ŝi estis, atentema, kun sia sendiligenta gracio, kaj kia respektplena, atentanta ekon de la miraklo de l' kordoj, ke ĝi efiku.

....

Sed ĉefe kiam mia patrino sidiĝis sur la turneblan tabureton, kaj almovis siajn manojn sur la blankaj-nigran klavaron, la simiino saltante sur ŝian ŝultron, unu brakon lokita ĉirkaŭ ŝia kolo, ekgvatadis je la vastaj harmoniondoj, kiuj estis elkateniĝontaj. Senmovadis ŝi, dum kuradis ŝiaj okuloj sekvante la vicon el klavoj, kiuj ellasis siajn sorĉadojn per nekredebla multrapideco.

....

Ofte por plezurigi niajn longajn tagfinojn kaj plenigi la malplenon de nia izoliteco, perditaj kiaj ni estis funde de tiu vilaĝego de malalt-Egipto, en tiu loĝejo, kiun nokto invadadis, kaj igis eĉ pli vasta, la duetaĝan, ni ĉirkaŭ la piano kunpremiĝis, kaj kune kantis jen malnovajn kanzonojn jen lidojn far Ŝuberto, kiujn nia patrino akompanis, kaj kiuj torente elflugis tra la malfermitaj fenestroj, vekante preterpase la sur terasoj kuŝantajn familiojn da felahoj kaj surkornicajn kolombojn, kies kveroj aŭdiĝis al ni. Tiam Noara troviĝis en plejalto de kvieta ĝuado, kiu ne pelis ŝin ekster ŝin, sed animigis ŝin en sento pli klara, pli konscia, tiu esti meze de ĉiuj anoj de la familio, je kiuj ŝi sentis sin kunligita pere de ligoj tre profundaj, kaj kiuj estis ŝin adoptintaj kiel personon, ia alia etfratino, iĝinta la fokuson de nia intereso, de niaj amuziĝoj kaj nia zorgoj. Kaj cele esprimi sian dankemon pro tio, en kio konsistis al ŝi tiujn muzikaj seancoj, ŝi lasis sian gvatsidejon surŝultran de mia patrino,

du mane plaŭdis kiel infanoj faras, poste saltegis de kantisto al alia, kun pepadoj, sinŝova tenereco, kvazaŭ plenumante ian aeran baleton, ridetante al ni, kaj al ni ŝajne kuraĝigante.

Nur multe pli malfrue mi kaŝe eksciis la sekreton de tio, kion de tiam por nur mi sola mi nomis „la muziko, kiu plorigas“, sekreton partigita jam de longe inter mia patrino kaj Noara kaj poste ni tri. Muziko donis al vivo de mia patrino ties veran dimension. Ĝi estis ŝia ĉiutaga spiro, kiel sur alttereno. Je iu ajna horo en la tago, abrupte, ŝi forlasadis siajn mastrumajn truditaĵojn, flankenĵetis la antaŭtukon, iris kaj lavis al si la manojn, pudris sin, kaj rifuĝiris en la salonon, kie ŝi ludadis iun nokturnon de Ŝopeno, al ŝi la ĉiama ĝufonto, la konstruaĵo de ŝia sekreta feliĉo, ŝia feliĉega patrujo. Neniu el inter ni aŭdacus, tiamomente, aliri ŝin aŭskulti en tiun ampleksan ĉambron, kun la ĉiuj kuntiritaj kurtenoj, kiuj tamen, ne sukcesis kontraŭi la sunan sturmon de egipta taghelo, ponardumantan el tra la latŝutroj la deziratan malhelon, tien kaj ien per ora sago pikanta la vernison de la en angulo forte sidanta piano. Ĉar kvazaŭ sentis ni, ke ŝi tie trovis sian retiriĝejon, ke ŝi akirigis al sia animo korvarman ripozon, kaj ke al si mem ŝi paroladis deŝutante siajn arpeĝojn kaj iaajn memoraĵojn. ...

Mi firompis tamen la nediritan malpermeson, kiun ni trudintis al ni, tiun neniam eniĝi en la salonon dum la tago, tiam, kiam disvolviĝis tiu muzika ritaro. La per revaĵoj distritema maturiĝanto kiun mi estis, kiun mi daŭre restis nun, alpremis tagon pretervole la malpermesitan pardonon. La Nokturno N°14 laŭ F-dieso minora eksonoris desupremalsupren en la etaĝojn, enŝoviĝante kunekun

siaj «polonezoj» vunditteneraj kaj per kiu plenis mia animo, enkapitis min, kaj min mergis en sian plenecon.

Kaj tro malfrue konsciiĝinta pri mia mallertaĵo, por retroiri – kaj eble estis mi ne tro malkontenta pri tio – mi enŝteliĝis silentege, sur piedpintoj, ĝis plej malproksima la brakseĝo, kie mi kaŭrkaŝiĝis, kie mi enprofundiĝis, kuntiriĝanta, superregita samtempe per timo, pudoro, respekto, kvazaŭ mi estis profaniginta ian sanktan lokon...

En duonlumo mi vidis mian patrinon oblikve, balanciĝantan sur sia tabureto kun la speciala kliniĝo de la busto, la falo de nigra hararo rulita sur la delikatkontura nuko, ŝia vizaĝo profile. Sed sur la alia ŝultro, tiu, kiu restis preskaŭ nevidebla, mi vidis, suprekaŭrinta laŭ la kutima teniĝo, kunproksimitajn la krurojn, Noara milde lulita de mia patrino, kiu ritme svingiĝis laŭ fluso kaj malfluso de la muziko. La simiino tute atentkaptitis de la klavoj kaskadaj, kun tiu sia-propra seriozeco, sed ofteme ĝi levadis sian etan inteligentan vizaĝon al tiu de la muzikistino, retroirante kaj flankenkliniĝante. Kaj tiam, dum tiu teniĝo, kiu ankaŭ esti al ĝi kutima, kie sentebliis neniom de ĝia kutima eksciteco, mi mirege ekvidis, ke ĝi estas retiranta la alian manon, restinta libera, kaj viŝanta la okulojn de mia patrino. Temis pri larmoj, kiujn ĝi premis, kies trenaĵon miaj okuloj traborante en duonmalhelon povis sekvi de palpebranguloj sur la vangojn.

Kial do mia patrino ploris? Kaj kial ja dum ludante Ŝopen-aĵon? Estis ŝajninta al mi, ke neniam ŝi estis atingita en plenumo de la Nokturno N<sup>o</sup> 14 ĝis tiom korŝira tenereco. Kaj tio eĉ pli konvikis min, ke mi estis malobeinta ian timigan malpermeson, kaj ke mia loko ne estis tie.

